

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2019-10-15 ĝis 2020-01-15.

Vivo de la Ligo

La Estraro

Aŭtune-vintre okazis diskutoj kaj klopodoj ene de la Estraro pri la kongresaj preparlaboroj rilate al la kongreso en Kebekurbo kaj pri la kongresloko por la kongreso en 2021.

La Prezidantino Mireille Grosjean sendis salutmesaĝon al la biblioteko kaj arkivejo en Vieno okaze de ĝia 90-a jubileo. En sia mesaĝo Mireille substrekis la bezonon kaj valoron de la konservado de gravaj dokumentoj por la Movado en papera formo. Plie ŝi sendis salutmesaĝon al la argentina kongreso kaj al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Burundo, kie ŝi fizike partoprenis.

Decembre la Prezidantino dissendis alvokojn al la sekciestroj kaj reprezentantoj por ĝustatempa membriĝo por 2020.

La Komitato

Septembre okazis reta voĉdono pri nia Regularo por Honoraj Membroj. Aprobata.

Oktobre okazis reta voĉdono pri la protokolo de niaj kongresaj kunsidoj en Serbio. Aprobata.

Novembre okazis reta voĉdono pri la Kongresa Regularo. La dokumento estis aprobata.

Decembre-januare estis organizita reta voĉdono pri la Jarraporto kaj Financraporto 2018. Aprobata.

Laŭ la statuto de ILEI en marto 2020 devas aperi nova Komitato. La Estraro petas ĉiujn sekciojn pripensi pri siaj komitatanoj dum januaro-marto 2020, elekti ilin kaj informi la Estraron.

Sekcioj

Komence de decembro estis dissendita la modelo por la sekciaj raportoj. La Estraro konvinke petas ĉiujn sekciestrojn fari kaj sendi la raporton ĝustatempe! Tiel la Ligo havos vastan kaj klaran bildon pri sia agado kaj havos atuton en sia mano por rilati kun ekstermovadaj institucioj.

La Estraro de ILEI rememorigas, ke la raportoj pri la agadoj de sekcioj devas alveni ĝis la 31-a de marto 2020. Bonvolu!

Bonaj novaĵoj venis el Polando, kie estis lanĉita nova projekto omaĝe al du polaj gravuloj T. Kościuszko kaj L. L. Zamenhof. La celo de la projekto estas, interalie, informi pri Esperanto.

La 15-an de decembro 2019, la D.R. KONGA ILEI-SEKCIO organizis etosoplenan Zamenhof-Tagon en la salono "YENGE" ĉe la sidejo de DKEA en Kinŝaso.

Dudek geesperantistoj el diversaj grupoj kaj partoj de Kinŝaso partoprenis la eventon memore al la 160-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. La etoso estis festa kun multaj prelegoj.

La sekciestro Florent NTOTO faris skizon pri ILEI kaj pri ĝia D.R. Konga sekcio. Estis okazo prezenti bilancon de la sekcio pri la agado 2019, dum kiu estis organizitaj konversaciaj rondoj, prelegoj, ekspozicioj, perfektigaj kursoj, ktp.

Unu el la gravaj atingaĵoj prezentitaj estis la agado ĉe la klubo "Junulara esperantistoj de la Nacia Pedagogia Universitato, JEUPN". Fakte, celante revigligi la grupon kaj sekve al la rekomendoj de unu el la konversaciaj rondoj, la D.R. KONGA ILEI-SEKCIO gvidas kursojn favore al membroj de JEUPN. La sekciestro anoncis, ke la sekcio estas preta tion fari kun ĉiu klubo aŭ grupo kiu interesiĝas. ILEI gratulas niajn samideanojn en Afriko kaj deziras plian prosperon! Notindas, ke pli ol 40 esperantistoj el la du Kivu-provincoj en orienta DR Kongo partoprenis la 7-an AKE kaj povis konatiĝi kun Mireille Grosjean. Kelkaj el ili estas elstaraj kaj lertegaj.

Nia prezidanto partoprenis la Zamenhofan-feston en CDELI en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, Svislando, kie oni festis la 160-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la 70-

jarigŝon de ILEI kaj la 130-an StudSabaton en CDELI. Certe okazis diversaj tiaj kunvenoj en multaj lokoj en la mondo.

Projektoj

Daŭras preparlaboro pri eldono de la Prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo de ILEI en Neuchâtel kaj La Chauv-de-Fonds, (CH) en 2015. Estis decidita la buĝeto de la projekto.

ILEI KOMUNA LEGADO OKAZE DE LA TAGO DE LA LIBRO 15-AN DE DECEMBRO

La 15-an de decembro, kiel kutime, okazis Komuna Legado en Esperanto vaste tra la mondo. Ĉi-foje estas proponita la teksto de Hector Hodler sub la titolo “Super” el la “Revuo Esperanto” de la 5-a de januaro 1915. La Estraro ŝatus havi statistikon pri kvanto de esperantistoj, partoprenantaj en tiu projekto kaj petas ĉiujn sekciestrojn, reprezentantojn, kontaktpersonojn kaj ĝenerale neindeferentajn personojn anonci pri tio. Koran anticipan dankon!

La anonco pri tiu agado kaj aldonaj informoj kaj registraĵoj aperas en la retejo de ILEI, en Facebook paĝo Esperanto + Edukado ILEI kaj en samnoma Youtube-kanalo.

Kapabligo

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado

Decembre okazis EIT- fina ĉeesta staĝo en Bujumbura, Burundo, dum kaj post la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) inter la 21-a kaj la 27-a de decembro. La kongreso altiris 135 partoprenintojn el 9 landoj: Burundo, DR Kongo, Tanzanio, Kamerunio, Madagaskaro, Togolando, Svisio, Belgio kaj Italio. Kadre de la kongreso okazis sesio de lingvaj ekzamenoj laŭ la ILEI/UEA sistemo, sub la gvido de Loka Ekzamena Komisiono kun la Prezidantino Mireille Grosjean, Adjévi Adjé el Togolando kaj Charles Hiza el Tanzanio. Dek du personoj submetis sin al la ekzameno, ses sukcesis kaj ricevis atestilon. Kadre de Eo-Instruista Trejnado okazis modelaj provlecionoj. Du kandidatoj finfine rajtis partopreni.

Grupo el diversaj afrikanoj ekstudis rete en 2018 jam kaj ILEI decidis, ke la fina fizika renkontiĝo okazu post la 7-a AKE en Bujumbura pro la fakto, ke Mirejo intencas partopreni tiun eventon. La konsisto de la grupo evoluis tra la monatoj, novuloj volis eniri la grupon, aliaj devis forlasi la grupon pro mankanta diligenteco, finfine restis du personoj: Aimé-Patrick Manirakiza, prezidanto de la Landa Asocio ANEB, kaj Gilbert Ndiokubwayo, estrarano de ANEB. Ambaŭ estas aktivaj esperantistoj kaj kutimas instrui la lingvon en Bujumbura. Ambaŭ sekvis la kurson EIT per la reto fidele kaj regule. La Kongreso en Bujumbura donis al ili la okazon instrui al du grupoj sub la okuloj de Mirejo, kiu povis sekvi po du lecionojn kaj taksi ilian instruadon. La kvar tagoj post la AKE estis okazo intense labori pri la lingvo kaj pri la pedagogio. Laŭ propono de Mirejo kaj kun la konsento de la partoprenantoj, aliaj esperantistoj povis ĉeesti tiun etan rondon. Du personoj uzis tiun eblon. En aliaj mondopartoj estas unu diplomita persono, Elisabeth Le Dru en Francio, kaj du aliaj kandidatoj survojas al diplomiĝo. Fine de EIT Mireille Grosjean preparis gravan detalan analizon pri la Esperanto-Instruista Trejnado por la Estraro de ILEI kaj la gvidantino de edukado.net D-ino Katalin Kovàts. Dezirantoj povos konatiĝi kun tiu temo en IPR-2020/1. Januare la Prezidantino Mireille Grosjean kunlabore kun la vic-kasistino Karine Arakelyan preparis detalan finanĉan raporton por la Estraro pri EIT en Bujumbura.

Eldonado

Survojas la laboro por eldono de la Manlibro pri Instruado de Esperanto kaj de la Prelegaro de la Tria Tutmonda Kolokvo okazinta en Svislando. La Estraro diligente sekvas la aferon.

Okaze de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto afrikanoj substrekis la bezonon havi lernolibron en la suahila lingvo. Tiu libro preskaŭ pretas, ĝia aŭtoro estas Nino Vessella. La tria eldono estos eldonita de UEA kaj ILEI kune, espereble tre baldaŭ.

Koleghelpa Kaso

Komenciĝis tradicia revizio de la listo kun la ricevantoj de la subvencioj. Faras tion la Prezidanto.

Kongresoj

La 53-a ILEI-kongreso en Kebekurbo, Kanado.

Septembre estis diskutita kaj poste aprobita pere de estrara voĉdono la kotiztabelo por la kongreso en Kanado. La kasisto William Harris proponis, ke li akceptu pagojn por ILEI-Kongreso tra la retbutiko de Esperanto-USA. La celgrupo estas usonanoj kaj kanadanoj, kiuj deziras pagi al ILEI per kreditkarto au PayPal. Tio multe faciligas la aliĝon al la kongreso. En septembro nia kasisto faris viziton al Kebekurbo.

Estas organizita regula informado pri la kongreso. Decembre ĝi estis publikigita en EKO pere de la redaktoro de tiu “Esperiga Komunikio” Stefan MacGill. En la januara kajero de la *Revuo Esperanto* aperos informoj pri la ILEI-kongreso en Kebekurbo kaj alvoko partopreni ĝin. Por IPR-1/2020 estis preparitaj diversaj interesaj tekstoj, artikoloj, raportoj kaj informoj pri la Kongreso en Kebekurbo en Julio 2020.

Decembre estis kreita reta aliĝilo. Ĝi estas disvastigata.

Decembre estis kreita pere de unu el niaj afrikaj samideanoj la emblemo por la kebekurba kongreso. Ĝi estis diskutita, korektita ene de la Estraro kaj aprobita rete.

Venontaj kongresoj

Januare la Estraro definitive decidis pri la kongresloko por 2021. En Edinburgo formiĝis LKK kaj komenciĝas preparlaboroj. Sciante, ke UEA organizos UK-on en Belfast, ni tiel estos en la sama ŝtato: Unuiĝinta Reĝlando / Britio; ni substreku la fakton, ke la kongresanoj bezonos nur unu vizon por partopreni ambaŭ eventojn.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Novembre laŭ la iniciato de Jozefo Nemeth varbcele estis dissendita la numero de IPR 4/2019 al la sekciestroj, al la retforumo e-ins (eo-instruistoj) kaj al alia retlisto Esperanto-en-Lernejojn. Krome, la ligo al la printkvalita varianto aperis en Facebook kaj en la retejo www.ilei.info.

Juna Amiko (JA)

Disvolviĝas vasta varbkampanjo pri JA. Post somera disdono de la ekzempleroj dum UK (pli ol mil) kaj BET-55 (pli ol 600) la ILEI-komisiito Stefan MacGill preparis varbilojn pri la revuo. Post diskuto ene de la Estraro komence de novembro ili estis dissenditaj al la sekciestroj. Komence de novembro estis preparita speciala numero de EKO “Esperiga Komunikio”, dediĉita al du revuoj de ILEI. Decembre aperis mallonga reklama teksto pri JA en la *Revuo Esperanto*, en IPR, preparitaj same de Stefan MacGill. Li vige daŭrigas la dokumentajn esplorojn kaj varban kampanjon pri la revuo. Fine de novembro danke al klopodoj de Stefan MacGill, Sebastian Cyprych, ILEI komisiito pri membroprizorgado, Stano Marček, la redaktoro, kaj la kasisto William Harris estis finpretigitaj la detalan statistikon pri abonoj. La plej multnombrajn abonojn por 2019 havas alfabetorde Brazilo (14), Finnlando (15), Francio (20), Italio (19), Korea Respubliko (12), kaj Usono (16). Por plibonigi la financon necesas pliaj abonoj. Estas ellaborita de Stefan MacGill detala plano de vasta varbkampanjo pri JA en 2020. Krome daŭras ene de la Estraro kaj koncernaj personoj de la laborgrupo vasta kaj densa traktado de financaj kaj abonaj demandoj. Estas esplorata maniero por tuja rekta abono de la revuo. **La estraro invitas fakulojn en tiu kampo partopreni la laboron kaj helpi!**

ILEI en la Reto

ILEI-membroj kreis grupon ĉe *Telegram* por ILEI-aktivuloj. Nuntempe partoprenas multaj aktivuloj. La Estraro de ILEI invitas ĉiujn ILEI-membrojn kaj ne nur membrojn aliĝi kaj partopreni

la diskutojn kaj agadojn de tiu grupo! Ju pli granda tiu grupo estos, des pli vasta kaj trafa estos la kolekto de ideoj por pli efika poresperanta priliga agado.

Daŭras nutrado de la ligo Youtube-kanalo Esperanto+Edukado ILEI. Tio evoluas danke al la kunlaboro de la Prezidantino Mireille Grosjean kun Aristophio Alves Filho, nia sekciestro en Brazilo. En Facebook kaj en tiu Youtube-kanalo ĉe Esperanto + Edukado ILEI estas diversaj informoj kaj filmetoj. Bonvolu rigardi!

Kunlaboro kun UEA

Okazis diskuto inter LKK de UK Montrealo, UEA-Estraro, kutimaj organizantoj de NASK kaj ESF pri bezonata lingvokurso antaŭ UK. Finfine la decido estis okazigi tian kurson en Montrealo mem. Do sen kunlaboro kun ILEI.

Fine de novembro estis traktita kaj konfirmita la temo por la tradicia Tago de la Lernado dum UK: “La homaj rajtoj: defia temo de edukado”. Kiel kutime la Tagon prizorgos Marija Belošević.

Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj

Bone evoluas kunlaboro de ILEI kaj NRO “Scio Sen Bariloj”, danke al kio estis okazita kurso en Benino, Afriko.

Novembre pere de *Juna Amiko* kaj ĝia rubrikestro Elena Nadikova komenciĝis kontaktoj inter ILEI kaj Uzbekia Esperanto Asocio kaj ĝia Prezidanto. La Estaro esperas al estonta fruktodona kunlaboro inter du organizoj.

ILEI apogas la Esperanto-instruadon en Jagelona Universitato (Pollando) per informado.

Daŭras kunlaboro inter ILEI kaj edukado.net. Krome komuna projekto EIT – Esperanto-Instruista Trejnado konstante okazas reciproka informado kaj varbado.

En 2020 ILEI denove iĝos la Honora Patrono de la OKA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ en Vroclavo, Polando, la 23-24-an de majo 2020 laŭ la peto de Małgosia Komarnicka, la Prezidantino de la tiea Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Por la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo ekde la 12-a de novembro 2019 estis aktualigitaj dupaĝaj informiloj por UNESKO jam entute en 12 lingvoj! Temas pri la lingvoj: bahasa, bulgara, araba, china, germana, angla, hispana, franca, itala, portugala, rusa, bengala, dana, finna, irana / farsi, kartvela, nederlanda, nepala, rumana, serba, tadjika, turka, vjetnama, pola. La Estraro kore dankas ĉiujn, kiuj helpis prepari la informilojn kaj invitas esperantistojn el aliaj landoj produkti saman informilon en sia lingvo!

La Prezidantino Mireille Grosjean organizis transdonon de la okpaĝaj dulingvaj informiloj en versioj angla-esperanto kaj franca-esperanto al ĉefobservanto de ILEI ĉe UNESKO Monique Arnaud. De tiuj belaspektaj informiloj ILEI printis jam duan fojon po mil ekzemplerojn.

Tiuj varbiloj, la unulingvaj kaj la dulingvaj, troviĝas en la retejo de ILEI:

<https://www.ilei.info/dok/varbiloj.php>

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova
Prezidanto de ILEI: Mireille Grosjean
2020-01-15

PS. En Svislando kuras la projekto pri valorigo de la arkivoj de Hector Hodler. La du ĉefaj organizantoj estas la Asocio Jura Brüscheiler (AJB) kaj Svisa Esperanto-Societo (SES), kiel kun-

prezidanto estas Mireille Grosjean. Ŝi estas je dispono, se iu havas pliajn demandojn pri tiu projekto.